

FLANDRA KATOLIKO

MAANDBLAD VAN HET
KATHOLIEK VLAAMSCH
ESPERANTO VERBOND

K. V. E. V.



MONATA REVUO DE LA
FLANDRA UNUIĜO DE
KATOLIKAJ ESPERANTISTOJ

F. U. K. E.

REDAKTIE : TURNHOUTSCHE BAAN, 277, BORGERHOUT (ANT.)
INTERŝANĜ-ADRESO : F. U. K. E., TURNHOUTSCHEBAAN, 277, BORGERHOUT

NUN ESTAS TEMPO REPAGI

vian kotizon por F.U.K.E.

La 1-11-36 komencas la nova jaro, do pagu viajn 15 frankojn jam antaŭe per aldonita pagilo.

BETAAL NU en RECHTSTREEKS

uw bijdrage voor 1937, want in November zullen wij zooniet een kwijting ten bedrage fr. 15,70 moeten aanbieden.

Sub la verda stelo

POSTRIGARDO

Jen la lasta numero de la unua jaro de Flandra Katoliko. Pasintan jaron, okaze de la kunveno en Syndikaat, Antverpeno, ni decidis anstataŭi la « Katholiek Esperanto Bulletin » per la nuna revuo. Por nia juna Unuiĝo tiu bulteno estis humila komenco. Baldaŭ tamen, pro la disvastiĝo de nia kara F. U. K. E., la estraro sentis ke ĝi estis devigata eldoni pli taŭgan organon. Dank' al la presita revuo, ni sukcesis varbi anoncantojn, gajni honormembrojn kaj altiri novajn membrojn. Ek de la komenco ni ricevis kuraĝigajn leterojn. Malnovaj revuoj, kiel Espero Katolika, Flandra Esperantisto, La Praktiko, La Verda Revuo el Vieno salutis la novan steleton el Flandra Esperantujo. La estraro ne haltis, kaj post kelkaj monatoj jam parolis pri ampleksigo de la revuo. Ek de Septembro pasinta, ni ĝoje havigis al niaj gelegantoj, duobligitan Flandra Katoliko'n.

Ĉu ni jam atingis nian celon? Tute ne. Kiam oni komparas nian revuon kun fratinedonoj, ĝi nur estas eta. Ni revas grandan estontecon por Flandra Katoliko, sed ĝi nur povas kreski sampaŝe kun nia Unuiĝo. Nia Unuiĝo ne konsistas nur el sia revuo, sed la vera forto estas ĝia anaro.

Je la fino de la unua jaro ni nun demandas al niaj membroj: Ĉu vi estas kontentaj? Kiajn plibonigojn, aŭ ŝanĝojn vi deziras? Sciigu al ni viajn ideojn, sugestojn kaj konsilojn.

Kaj niaflanke ni ankaŭ ŝatas diri vorteton pri la malfacilaĵoj ĉiujspecaj, la ega laboro kiuj estas la prezo de la regula eldono de nia revuo. Kiam ĉiumonate la leterportisto enmanigas al vi Flandra Katoliko'n, ĉu vi tiam pensas kiom da klopodoj ĝi ofte kostis antaŭ ol alveni ĉe via tablo? Nu, tiun laboron, ni faris je la honoro de Dio kaj la bono de nia Unuiĝo, sed ni samtempe esperas ke la F.U.K.E.-anoj komprenu ke ne sufiĉas legi kaj poste flankenmeti ĝin. Tute ne, se la estraro faras sian eblon, la membroj siaflanke ankaŭ havas la devon fari ion returne: propagandi.

Estas tiel facile, paroli pri Esperanto, la katolika movado kaj nia Unuiĝo ĉe viaj amikoj kaj konatuloj. Vi ne ĉiam sukcesos, certe ne, — kiam, laŭ la mezuro de la farita laboro, ni estus estinte rekompensitaj per adekvata sukceso, F.U.K.E. jam nombrus pli ol mil membroj, se ne pli — sed estu, kiel ni, konfidemaj, persistemaj kaj fine vi sukcesos kaj venkos.

Jen, kion ni demandas returne por nia

humila, sed granda laboro.

Flandra Katoliko nun komencas ĝian duan jaron. Kion ni atingos? Dependas de la Bona Dio, de Ni kaj de Vi. Antaŭen do kaj ke Flandra Katoliko vivu!

La estraro.

La katolika esperanta vivo

PRINCIPIEEL EN EÉN

De vraag wordt gesteld waar staat de Katholieke Esperantobeweging; in welk kader past zij. Het antwoord kan kort en duidelijk zijn. Onze beweging is cultureel en geënt op de Katholieke beginselen. Daaruit volgt — moet logisch volgen — dat zij staat aan de zijde van het kerkelijk gezag. De principes der Katholieke Kerk zijn de onze, haar doeleinden streven wij na. Wij erkennen geen ander geestelijk gezag dan dat der Kerk, die van Christus zelf niet te scheiden is.

Katholiek Esperantisme is Katholiek Apostolaat; onze actie is Katholieke actie. Bewust en zonder reserves willen wij hiervan de consequenties aanvaarden. Wij willen dus niet slechts onze actie stellen in dienst der Kerk, maar ook in alles haar leiding aanvaarden. Wij willen principieele Katholicken zijn, ook als Esperantist. En niet het minst daarom moeten wij één zijn. Eén, omdat elke beweging die in zich zelve verdeelt is, ten gronde moet gaan.

Eén, omdat wij slechts door ééndracht tot macht kunnen komen om onze idealen te verwezenlijken. Eén vooral, omdat het de wens is van Paus en bisschoppen dat wij één zullen zijn. Wij willen één zijn met de Katholieke actie. Hoe zou ons dat lukken, als wij niet één zijn onder elkander?

De Katholieke Esperantobeweging, nationaal en internationaal is daarom éénsgezind en wil het blijven. Eénsgezind tot haar doel, éénsgezind in haar middelen, éénsgezind vooral in haar volgzaamheid aan het Kerkelijk gezag.

Daarin schuilt onze sterkte en onze kracht. Meer dan ooit, en wellicht nog beter dan anderen zien de Katholieke Esperantisten van heden in, dat de redding van Europa — ja der geheele beschaafde wereld — uit den chaos, slechts mogelijk is door aanvaarding en beleving eener christelijke cultuur. Die cultuur willen wij bevorderen met ons eigen modern middel, de internationale hulptaal Esperanto. Als Katholiek en als Esperantist, kennend de verhevenheid onzer idealen en de grootheid van ons doel, zijn wij optimisten die met vertrouwen en met volharding onze actie voeren.

Wij verliezen dat vertrouwen ook dan niet wanneer sommigen onzer een enkele maal uit menselijke zwakheid zijpaden inslaan en daarbij het groote doel uit het oog verliezen. Integendeel, voor ieder rechtgeaard Katholiek Esperantist zal dit een aansporing zijn tot nog groter activiteit in echt christelijken zin, opdat ook die medestanders, die in isolement tijdelijk hun kracht zochten spoedig met ons als één groote schare mogen optrekken.

Uit « *Nederlanda Katoliko* »

H. DAMEN.

De Esperanto-wereld

AFDRUKKEN VAN INDRUKKEN

(*daŭrigo*)

Zaterdagmorgen 8 Augustus vinden we ons terug in de kathedraal van de H.H. Petrus en Paulus, waar Pater Schmalbaug (Oostenrijk) preekt onder de waarlijk majestueuze gewelven. Pater Kao droeg er de H. Mis op voor de overleden leden van I.K.U.E. De laatste werkvergadering brengt nog velerlei belangrijke onderwerpen ter tafel als Pauselijke goedkeuring van I.K.U.E., facultatieve invoering van Esperanto op seminaria, vertaling van de H. Schrift in Esperanto, apologetische brochures, boekrecenzies, enz. Natuurlijk sprak onze Pastoor Poell over 't belangrijke I.K.U.E.-werk.

Dan komt het einde en 't afscheid, veel te snel maar noodzakelijk omdat de tijd noopt. Om één uur is de Nederlandse groep op reis naar Wenen, met uitzondering van uw verslaggever, die de terugreis naar Dresden aanvaardt. Daar wacht hem nog een gezellige avond bij een van zijn nieuwe kennissen thuis. Nog 12 uur sporen en ik ben op 't punt van uitgang teruggekeerd.

't Was een goedgeslaagd kongres en een vlotte reis, bovendien heb ik een aardig stuk voor m'n aanstaande huishouding over twee grenzen gesmokkeld. Meer kun je niet wensen!

Uit « *Nederlanda Katoliko* »

J. H. WESTEN.

PRI LA ESPERANTO-EKSPOZICIO EN BRNO

Ne malproksime de Besedni dum la jam al ni konata kaj kvazaŭ hejma domo de la Katolika Kongreso en Brno, la verda esperantista flago ankaŭ flirtas ĉe la enirejo de alia granda konstruaĵo. Kiu konstruaĵo vi demandas? Ho, ne malinteresa ĝi estas, geesperantistoj, ĉar estas la Arta-Industria Muzeo de Brno. Artan kaj industriajn ekspozicion ni tamen ne vizitis dum la kongresaj tagoj, ĉar kompreneble, tempo mankis al ni por tion fari. Sed, du salonetoj de la muzea konstruaĵo dumkongrese apartenis al la esperantista klubo de Brno. Kaj ĝi tre bone utiligis ilin. Diversspecaj esperantaĵoj estis elmetitaj en vicoj da ŝrankoj kun vitraj kovriloj, tiel ke oni povis vidi ĉion sed tamen nenio malpurigis aŭ malordigis. Nia « *Espero Katolika* » ĉeestis en siaj diversaj formoj kaj kovertoj kaj tiel montris sian forton malgraŭ ĉiuspecaj malfacilaĵoj kiujn ĝi travivis. Multaj aliaj esperantistaj gazetoj, inter alie Flandra Katoliko, montris klare ke nia mondlingvo jam disvastiĝis, mi eĉ povas diri en ĉiuj partoj de la mondo. La librokolekto tamen ne ŝajnis al mi tre granda. Eble mi ne vidis ĉiujn kiuj alstis, ĉar mi ja ne tre longe restis en la ekspozicio, eble la Brnoaj gesamideanoj nur el-

montris librojn, kiujn ili okaze mem posedis.

Speciale granda kaj bela aro da reklamiloj, eldonita en Aŭstrujo, okaze de la nunjara Viena kongreso, plene alestis. Ĝi sola eĉ povus konvinki neesperantistojn pri la utileco de Esperanto en la reklamo.

Pli interesa por ni katolikoj estis la malgranda sed klara fako de I. K. I.: Internacia Katolika Informejo. Ni povis vidi ke I. K. I. malrapide sed certe kreskas, atingas nekatalikojn en mondpartoj en kiuj ili eble unuafoje aŭdis ion pri la katolikismo, kaj tial I. K. I. vere estas instituto, kiu meritas subtenon de ĉiuj katolikoj, speciale de ni katolikaj Esperantistoj. Poŝtmarkkolektantoj speciale povis ankaŭ en la ekspozicio, ĝui la vidon de multlandaj poŝtmarkoj sur korespondajoj esperantlingvaj el multaj landoj.

Por fini, mi ankoraŭ volas menci ke multaj fotografaj ornamis la vandojn de la ekspozicio. Bildo de Dro Zamenhof kompreneble okupis honoran lokon kaj bildoj de antaŭaj kongresoj altiris la atenton. M. A. G.

Tra la Gazetaro

En « *La Praktiko* » sub la rubriko « *Al la Venko* » n° 471, ni legis: Regulaj artikoloj pri Esperanto en Flandraj gazetoj. La plej granda katolika ĵurnalo « *Gazet van Antwerpen* » aperanta en 100.000 ekzempleroj, kaj la provincaj semajnaj gazetoj « *Het Belang van Limburg* », « *De Bilzenaar* » komencis publikigi regulan monatan kaj semajnan artikolon pri Esperanto. La ĵurnalo « *De Morgenpost* », taggazeto de la flandra intelektularo, malfermis semajnan Esperanto-rubrikon.

En « *Espero Katolika* » aperis la anonco de nia radio-parolado de la 24-a de Septembro pasinta.

En « *Nele* » (Borgerhout): De oogen gaan open, La *Espero I & II*, Propaganda, Gespreken over Esperanto.

En « *Morgenpost* »: Niaj Kongresoj I & II, Onze Radio-uitzending, Eigen Litteratuur I-II-III-IV.

En « Radiogids » : Wij gaan met onze tijd mede — Moderne Wereldmissie kaj fotoj de nia Prezidanto kaj de Pastro Dumoulin S. J.

Nia movado

RADIO-PAROLADO. — La ĉefa okazintajo dum Septembro estis nia radio-parolado en K.V.R.O. Estis interdema parolado inter nia Prezidanto kaj Pastro Dumoulin S. J. (kiu nun estas en Romo, kiel helpsekretario de la ĝenerala estro de la Jezuitoj). Ni spertis neatenditan intereson kaj sukceson. Ne malpli ol 30 leteroj kaj kartoj alvenis de aŭskultantoj, petante klarigojn pri nia Unuiĝo kaj lernomaterialo. Nia Prezidanto eĉ havis la honoron ricevi leteron de komunisto, kiu demandis kiamaniere ni povus kunligi la ideojn « paco per Esperanto » kaj « kontraŭbatalado de la komunismo per Esperanto ». Ĉu li eble pensis ke ni intencis lin aŭ ilin mortpafi per Esperanto? ne komprenante ke nia agado celas uzi Esperanton por nia religio, same kiel ili faras de la Internacia Lingvo, por disvastigi perfidajn ideojn.

Tiuj, kiuj aŭskultis la paroladon, kaj la aŭdigon de la disko « La Espero » nur povas esti fieraj, kaj ni ege gratulas ambaŭ paroladistojn pro la vera interesa disaŭdigo.

Ni esperas ke sekvontan jaron, ni havos alian ¼ horon kaj ke ni spertos saman sukceson.

ESPERO KATOLIKA

LA TRAVIVAĴOJ LAŬMONATE DE ABONPERANTO

La 1-an de la monato, mi sendas al ĉiuj abonantoj tiutempaj sciigojn ke baldaŭ Espero Katolika fariĝos la oficiala organo de nia internacia organizaĵo, I.K.U.E.

La 2-an. Frumatene telefonalkvoko ellitigas min: oni volas scii ĉu Sro Sch. ricevos tiujn postultajn 75.000 frankojn de IKUE, estus hontinde... » Por trovi eblecon ankoraŭ iom dormi, mi promesas malhelpi tion.

La 3-an. Nia Vicprezidanto, Dro en Ĥemiaj Sciencoj, proponas ke mi al la eldonisto nur

pagu pomonate. Se mi bone komprenas lin, mi atendu ĝis fino de iu monato, tiam ekzamenu ĉu ni 1 aŭ 2 Espero Katolika'jn ricevis, kian estas la pli dika aŭ pli interesa, kaj nur al ties eldonisto pagi laŭmonate, tio estas 35/12 da frankoj po abono...

La 4-an. Iu longjara abonanta Frato, kiu sin taksas « nek franskiljono (francemulo), nek flaminganto, (flandremulo) » diras ke li ne komprenas ke la disputoj inter Holandanoj aperu nun en E.K. Tio ne okazis kiam Pastro Ramboux ĝin eldonis...

La 5-an. Pastro L. Dumoulin S. J. — al kiu mi petis repagi sian abonon diras ke li prefere iras al Romo por fariĝi sekretario de Lia Ĝenerala Moŝto S. J., pli volonte ol ankoraŭ legi tiajn E.K.

La 6-an. Mi ricevas 100 aldonojn nederlandlingvajn al E. K. Mi petis ilin al Sro Sch. kun espero eviti personajn klarigojn kaj leterojn. Mi dissendis kelkajn, disdonas aliajn, sed, o. ve. nur nun mi vekis dormantajn hundojn...

La 7-an. Mi ricevas belan libron por recenzo, mi ĝin legas, ĝuas kaj iom kritikis kiel decas. Mi i.a. ne akceptas la esprimon: « inter-tuj-apude ». Vidu kio okazis la 10-an kaj la 16-an.

La 8-an. Mi ricevas 3 leterojn de Sro Sch. el E., de Sro H. el H., de Sro D. el S.B., kiuj — stranga unueco — ĉiuj diras ke estas en la mondo honestaj kaj malhonestaj personoj. Mi elektas la plej longan, de Sro D. el S.B. kaj mi inter-tuj-apude (pardonu) legas pri episkopaj konfidencoj, pri Pastro P., k.t.p. Nu mi diras, estas io por nia religia konsilanto, kaj mi sendas ĝin al li.

En la dua, Sro H. el H. diras ke lia bofratino estas inter la honestaj personoj, ĉar ŝi havis jam dum 8 tagoj mian leteron inter siaj paperoj, kiam ŝi redonis ĝin al sia bofrato. La malhonesto persono ŝajnas esti redaktoro de iu organo, kiun li titolas flandralingve per « vieze ». Mi metas tiun vorton en la saman skatolon kiel inter-tuj-apude...

La tria letero de Sro Sch. el E. entenas minacojn por IKUE kaj E.K. pri ruiniĝo, neverajoj rakontitaj, kaj timo pri eldono de nova organo je falsa bazo.

Kiam mi kunmetis la tri leterojn (kaj aldonis 100 aliajn) mi konvinkiĝis ke estas tempoperdo ĉar Brno decidis kaj la 3 skribantoj esperas ke la decidoj de Brno estu plenumitaj. Do.. Sed pro multo da arboj, oni ofte arbaron ne vidas.

La 9-an. Suda-Krucana FUKÉ-anino sciigas al mi ke Sro Sch. estas lerta kaj respektata gvidanto, kaj ke oni ne sekvos mian konsilon forlasi lin por eblegi reunuiĝon de Suda Kruco al N. K. Kortuŝa estas la admiro de la anoj kaj mirinda la sukceso de la plej forta katolika grupo en la mondo. Despli kialo por resti en la vicoj de la I.K.U.E.

La 10-an. Nia religia konsilanto, la sindona Pastro Beckers, (inter ni, bona amiko de Frato Van Zon,) skribas al mi ke mi devus fari la recenzon de la lasta verko de Frato Van Zon. Mi jam la 7-an ĝin sendis al F.K., ĝi ja estas jam presata...

La 11-an. Sro Patiny el Bruselo, ŝatus vidi en E.K. je la unua paĝo, la ĝeneralan enhavon, aŭ almenaŭ en la lasta numero por la tuta jaro.

La 12-an. Iu abonanto plendas ĉar li ne volas bildojn sur tuta paĝo de E.K. Ĉu ni ne havas novajojn? Sed li mem nenion ensendas.

La 13-an. Pastro C.V.H. esperas ke mi estas tiel saĝa ne doni la abonmonon de E.K. al ne-raĵtigito.

La 14-an. Suda Krucano skribas al mi ke oni faros sian eblon por reiri al N.K. Ankaŭ Sro Sch. tion poste skribos. Mi fariĝas devove kuraĝa por trovi solvon.

La 15-an estas dimanĉo, kiam mi nur por FUKÉ povas labori...

La 16-an mi legas recenzon en E.K. pri iu libro, kiun ankaŭ mi recenzis, vidu la 7-an kaj la 10-an, sed mi ŝatus relegi ĝin ĉar mi verŝajne legis alian kopion. Nu, Frata Moŝto,

tiun duoblan sistemon mi ĝis nun ne konis... Mi devas diri ke mi forgesis menci ke la ekzempleron, kiun vi sendis al mi, havis makulon sur la tria paĝo malsupre: ke la koverto estis iom ĉifite je la dekstra supera flanko, kaj ke la poŝtmarkoj, kiujn vi uzis por via alsendo, estis ĉiuj netaŭgaj por Kolektantoj...

La 17-an mi forstrekas kiel abonantojn S-rojn Roose, De Zutter, kaj Kat. Rondo, Mortsel.

La 18-an Kat. Rondo repagas!

La 19-an ĝis la 29-a mi ekkomencis korespondadon kun la diversaj interesuloj esperante ke mi, kiel eksterlandano, povos ion atingi en la senco de repaciĝo.

La 30-an mi ekhavis gripon, verŝajne E.K. gripo, kaj mia posteno de abonperanto por Espero Katolika estas luebla...

P. S. Mi jus pretiĝis tiun raporton, kiam alvenis la ĉisuban leteron, kiun mi publikigas en la originalaj flandra kaj esperanta tekstoj. Mi lasas la respondrajton al mia anstataŭonto.

L. C. abonperanto E.K.
Poŝtĉekk. 2090.34

ESPERO KATOLIKA

Ste Mariaburg. 30 Sept. 1936.

Zeer Geachte Heer,

Op uw omzendbrief van begin dezer maand ben ik zoo vrij mijn bescheiden meening naar voren te brengen, omtrent de K.E.-beweging.

Bij allen die zich eens warm maakten voor het Esperanto-ideaal, en waarbij na korteren of langeren tijd het vuur van den ijver doodging, mag men zeggen dat het stierf aan een soort ondervoeding. Waar zoo weinig de gelegenheid bestaat om Esperanto te spreken, moet voorzeker de gelegenheid bestaan om in het Esperanto te correspondeeren, met menschen uit andere landen, die ons ideaal koesteren, die ons dingen vertellen en zaken leeren die we niet of minder goed wisten en waar we belang in stellen. Daarom zie ik

met ongeduld het oogenblik tegemoet, waarop het jaarboek der K.E. zal verschijnen.

Voor wat nu het maandblad betreft zou ik voorop stellen, de leuze: *Actualiteit*. Actualiteit immers boeit en interesseert. Wij staan in dienst van de katolieke gedachte, van de katolieke leer. Ons arbeidsveld ontbreekt het, noch aan ruimte, noch aan diepte! Maatschappelijke en sociale werken, godsdienstige en politieke gebeurtenissen, vredesactie. En wat gezegd van de « katolieke actie »? Zou er, in al die domeinen niet veel te leeren vallen bij onze naburen? Konden we geen kijkje nemen over hetgeen er op deze en zooveel andere gebieden, bij andere volkeren gepresteerd wordt. Natuurlijk dient er rekening gehouden met de ontwikkeling en de psychologie van de bewoners in andere landen. Maar waarom zouden we ook daaromtrent geen overzicht krijgen?

Zoolang we geen bevoegdheden hebben, die voor ons in Esperanto schrijven, zouden we dan geen gewillige en goede vertalers vinden?

Ik zou E.K. meer actueel en meer uitgebreid wenschen! De illustraties doen er aangenaam aan. Een novelle of een sprookje wordt door eenieder graag gelezen als een ontspannend verzet. Een vragenbus of een postbus ware er misschien wel op hare plaats als spreekbuis tusschen redactie en lezer en tusschen de lezers onderling. De geldmiddelen? Ja voorzeker, dat is de zwakke kant! We kunnen wel op een veel grooter aantal abonneenten rekenen, doordat we interessanter zullen zijn! En zijn er niet enkele katolieke gegadigden, die door een milde gift (een rijke moet zooveel geven eer zijn zijn gift mild is!) onze werking van financieele zorgen willen bevrijden? In die gedachtenlijn heb ik mij dikwijls afgevraagd, om welke gewichtige redenen ons blad uitgegeven wordt in 't land met den hoogsten wisselkoers! Kan dit dan in België of in het

Gr. H. Luxemburg niet gebeuren?

Na de zwakke kant, wil ik ook de zwakste kant onzer beweging aanraken. Dit kan ik nochtans niet zonder heel veel spijt!

Heel nieuwsgierig had ik E.K. van September tegemoet gezien om den afloop van het kongres van Brno, dat heropstanding en nieuw leven zou brengen!

Helaas, driemaal helaas! Waar ik het verslag meende te vinden: een vitterij tusschen bestuursleden, de zooveelste!

Post tiuj kelkaj konsideroj, kiujn volonte mi estus farinta esperantlingve, nepre mi volas gratuli la Estraron de Fuke, pro tiu, kiun ĝi realigis en malmulte da tempo!

La amplekso de nia revuo jam duobliĝis!

La sukceso en propra lando estu por ni konsolo, sed ankaŭ instigo por ke ni faru de Fuke organizajon, fortan kaj disciplinplanan, kiu kapablos influ la internacian movadon. Tiam, en I.K.U.E., kuniĝos ĉiuj katolikoj konsciante pri la vortoj de ilia Dia Majstro: « Vi estas la salo de la tero »!

Esperanto por ili estas la facila ilo per kiu ili kontaktiĝos internacie. La tiamaniere kuniĝataj fortoj de homoj malprofitemaj, kiuj nur fratojn rekonas en ilia ĉirkaŭaĵo certe influegos la naciajn kaj internaciajn rilatojn de la homoj.

Tiu por la pli granda honoro kaj gloro de Dio, kaj por la feliĉo tera kaj la feliĉego eterna de ĉiuj homoj, niaj fratoj en Kristo. Kun ĝoja koro mi hodiaŭ ĝiras 15 frn pro Flandra Katoliko; kun bedaŭro kaj kelke da malfido mi aldonas 35 frn pro E.K. ambaŭ por la jaro 1937.

Kun fideleco kaj kristanaj salutoj.

L. Hendricks.

ESPERANTOKURSO MORTSEL

La Esperanto-kurso, organizita la 16-an de Septembro en komunuma lernejo de Mortsel, sub la aŭspicioj de « Landelijke Bedienden Centrale » bone sukcesis, dank'al la propa-

gando, farita de la gemembroj de la loka « Katolika Rondo Esperantista ».

La profesoro, nia samideano Hector Vermuyten havas la taskon esperantigi dekkvinnon da gelernantoj. Ni esperas, ke el tiu kurso ekfloros nova vigla vivo por nia movado en Mortsel.

INTERNACIA KATOLIKA INFORMEJO. — Niaj gelegantoj legis en nia septembra numero ke la P. Ĉ. de I. K. I. por nia lando estas n° 61.597 de Pastro A. v. d. Pluym, Wandre.

F. U. K. E. ĝiras nome de la Unuiĝo: 20 fr. Envenis ankaŭ 10 fr. de « Nomo ».

Alia nekonatulo ĝiris 10 fr. Aalsten, kun peto havigi tiun sumon al IKI.

Ni nur povas kuraĝiĝi niajn membrojn sekvi tiujn ekzemplojn. Ni esperas ĉiu monate anonci samspecajn ĝirojn je favoro de IKI.

DEMANDANGULETO. — Regule envenas leteroj petante ĉu gramatikajn klarigojn, ĉu demandojn pri la movado. Por respondi al tiuj leteroj ni ek de la nuna F. K. malfermas « Demandanguleton ». Ni tamen petas ke ĉiu demandanta aldonu minimume 2 fr. en p. m. Ni konsilas al niaj membroj, regule fari uzon de tiu rubriko, tiamaniere 1° nia revuo iĝas pli interesa, 2° la respondoj utiliĝas al ĉiuj, 3° ili helpas al la vivtenado de nia revuo.

EKSTERLANDAJ RADIO-DISENDOJ

Ni havas la plezuron sciigi niajn membrojn ke la Itala « Direzione Generala per il Turismo ». Via Marghera 2, Roma 116, monate sendas al ĉiu petanto, la programon de la fremdlingvaj dissendoj. Oni eĉ povas havigi la tekston de la paroladoj. Programo kaj teksto estas senpagaj.

Kutime ĉiun Sabaton okazas Esperanto-disaŭdigoj el 2 Ro (31.13 m - 6935 Kc) kaj Roma-Bari-Napoli (420, 8 - 713 Kc) je la 19.05 MET.

La Verda Stacio, Brno, Kounicova 44, Ĉeĥoslovakujo ankaŭ eldonas bultenon. Ĝi aperas laŭbezone. Ĝi enhavas informojn pri la ĉeĥoslovakaj E-dissendoj, kaj estas ekspe-

data senpage al redakcioj, radioklubo kaj aliaj kunlaborantoj.

NOVAJ MEMBROJ.

Sinjoro A. De Bruyn, Willebroek.

» A. Coppé, Gendbrugge.

» L. Le Borgne, Gent.

» M. De Valck, Gent.

» F. Knaeps, Leuven.

Fraŭlino Marie Evrard, Vieno, Austrio.

» A. Kok, Eindhoven, Nederlando.

Pastro, Tayemans, paroĥestro, Merksem.

Ŝanĝo de adreso: Pastro L. Dumoulin S.J. Borgo Sta Spirito 5, Roma 113 Italujo.

AFIŜOJ. — Ili estas ĉiam haveblaj ĉe nia sekretario, Turnhoutschebaan 277, Borgerhout. Konigu vian Unuiĝon ĉie — la atiaŝo efike helpos vin tiucele.

GRAMATIKO. — Beknopt Leerboekje der Wereldtaal, door P. Maassen. La dua eldono ĵus aperis en freŝa nova koverto kaj plibonigita. La unua estas tute elĉerpita kaj konis grandan sukceson kaj rapidan disvendadon. Ni fidis je niaj anoj kaj precipe niaj delegitoj por ke ili donu al ni helpan manon. La vintra sezono estas favora tempo por disvastigi lernomaterialon. La prezo estas:

Por 1 ekzemplero	Fr. 2.00
Por 5 ekzempleroj	9.00
Por 10 »	17.50
Por 25 »	42.50
Por 50 »	80.00
Por 100 »	155.00

Mendebla ĉe la sekretario, Turnhoutschebaan, 277, Borgerhout.

KUNVENO EN BILZEN. — Nia delegito por Bilzen, S-ro K. Dubois sciigis nin, ke la 15-an de Oktobro okazos en Bilzen kunfandita kunveno de Katholieke Jongeren Vredesactie kaj F. U. K. E. Pastro A. Beckers, profesoro en la normallernejo Mechelen a/maas, tie parolados. De Bilzenaar ankaŭ anoncis tiun okazintaĵon. Ni atendas raporton, kiun ni publikigos en la novembra numero.

GRATULOJ. — F.U.K.E. sincere gratulas la familion J. Vandendooren-Vandenberghé pro la naskiĝo de fileto, baptista Erik.

ENHAVO DE FLANDRA KATOLIKO, 1^A JARO (Nov. '35-Okt. '36)

SUB LA VERDA STELO			
<i>Calloens</i>			
Bij 't verschijnen van F. K.	paĝo	1	
Ĉe la nova jaro		9	
Wat is Esperanto ?		21	
Esperanto-Vredestaal		29	
<i>Estraro</i>			
Flandra Katoliko		9	
Postrigardo		41	
<i>Heilker</i>			
Gratulojn		13	
<i>Maassen</i>			
De groene week		17	
Katholieke Wereldconcentratie		33	
<i>Naster</i>			
Al plua konkiro		2	
<i>Vander Pluijm</i>			
Twee intern. talen		5	
X...			
Onze eerste uitgave		25	
KATOLIKA ESPERANTA VIVO			
<i>Pastro Beckers</i>			
Godsdienstig hoekje		10	
Esperanto en Mechelen		33	
<i>Pastro Dumoulin</i>			
Voor de Meimaand		21	
<i>Pastro Gemertano</i>			
Eenheid		13	
<i>Pastro Snet-Riem</i>			
De Kath. Pers		17	
<i>S-ro Scherpsteen</i>			
H. Luitgarde		25	
<i>Pastro Vander Pluijm</i>			
Katholieke Eenheid		2	
Elk eerlijk middel is welkom		29	
<i>S-ro Damen</i>			
Principieel en één		42	
DE ESPERANTO-WERELD			
<i>Paesmans</i>			
Esperanto-postzegels		18	
Weenen 1936		10	
<i>Vander Pluijm</i>			
Esperanto en Geloofsverbreding		36	
			<i>Westen</i>
			IKUE-Kongres te Brno
			34-42
			X...
			Berichten
			14-36
			M. A. G.
			Pri la Esp. ekspozicio en Brno
			43
			LITERATURO - LEGAĴOJ
			<i>Gezelle</i>
			Malnova Breviero (Vermuyten)
			7
			Ja kial povas mi ne (Vermuyten)
			26
			M. A. G.
			Ekvilibro
			18
			La Pokaleto
			30
			N...
			Esperanto servas
			37
			X...
			La Rokaj Preĝejoj (Cammaert)
			11-18-22
			TAALRUBRIEK
			<i>Maassen</i>
			Ken Esperanto
			31
			LIBERA ANGULO
			<i>Juvenos</i>
			Sinekuro
			22
			<i>Scherpsteen</i>
			Ter overweging
			8
			PACMOVADO
			<i>Eyckerman</i>
			Int. Vredes-Bidweek
			4
			<i>Paesmans</i>
			Paco
			14
			X...
			Mi ne povas porti armilojn
			11
			PREĜOJ
			Porpaca preĝo (gebed v. d. vrede)
			4
			TRA LA GAZETARO
			7-12-14-19-23-26-31-38-43
			RECENZOJ
			7-30-37
			NIA MOVADO
			2-5-12-14-19-23-26-31-38-44